



TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44300 NANTES, Francujo

J A R A B O N O

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1990 — 3


(JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... La metra sistemo...



... La kirurgio antaŭ 5 000 jaroj.

Trimonata informada kaj kultura revuo

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
Tridek jarojn poste (S. Boniol)	3-4
La metra sistemo (F. Boyet)	5-6
La ĥirurgio antaŭ 5000 jaroj	7-8
Senmaskigu la pseŭdonimojn(B.Golden)	9-10
Monte-Kristo (A. Dumas-tr.R.Dupuis)	11-13
Por via distro	14
La vivo en Gresillon	15-16

Esperanto tra la Mondo



LA UNIVERSALA KONGRESO DE U.E.A-

La 75-a universala kongreso de UEA okazis en Havano (Kubo) de la 14-a ĝis la 21-a de julio. Ĉeestis 1 600 partoprenantoj el 52 landoj. La ŝtatĉefo Fidel Castro mem venis por la malfermo de la kongreso. Okazis 11 prelegoj, kelkaj en la universitato de Havano.

ESTONTAJ KONGRESOJ KAJ RENKONTOJ-

La universala kongreso de UEA okazos en 1991 en Bergen (Norvegio), de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto.

Internacia Junulara Kongreso, de la 20-a ĝis la 27-a de julio en Karlskoga (Svedio). Temo: "Mondaj movadoj".

Okaze de la centa datreveno de la naskiĝo de Kalocsay kaj Baghy, Internacia literatura kaj kultura forumo okazos en Budapeŝto (30-de junio - 6-a de julio).

Tiun ĉi jaron, en Litovio: Internacia Metodika Seminario de esperanto-instruado, en Kaunas, 4-11-a de novembro 1990. Informas: Litova Esperanto-Asocio, ab.k.167, SU-233000 Kaunas C, Litovia, USSR.

LA FERVOJISTOJ KUNVENAS- 393 kongresanoj el 21 landoj, partoprenis la 42-an Internacian Kongreson de la fervojistoj (IFEJ) en Hamar (Norvegio) en junio.

En 1991 tiu kongreso okazos en Brno (Ĉeĥoslovakio), 11-17/05. Aperis fervoja terminaro en esperanto kiel suplemento al 6-lingva "Lexique Général des termes ferroviaires". Ĝi entenas 10 205 terminojn.

EN BĴALISTOKO- Kvankam la ekonomia situacio en Pollando bremsis la planojn por starigo de Zamenhof-Centro, la lokaj instancoj daŭre favoras la projekton, kiel la kultura ministerio. UNESKO akceptis tiun projekton, kiel oficialan projekton de la Jardeko por Kultura Evoluigo kaj tio estas grava decido. La Akademio Internacia de la Sciencoj el Sanmarino malfermis oficejon, kaj anoncis planon por konstruaĵo

sur parto de la tereno de la estonta centro.

EL ĈINIO- Vi havas eblecon labori en Ĉinio se vi parolas esperanton kaj se vi estas fakulo emerita aŭ nuntempe libera. Kontaktu S-ron Wang Xigen, Shitaixian, Renshi-jun, Anhui, CN-245100 Ĉinio.

Dum majo la unua Ŝanhaja Simpozio pri Scienco kaj Tekniko en esperanto kunvenigis 148 partoprenantojn al tutsemajna diskutado.

La turisma fakultato de la Qingdao-universitato funkciigas turisman esperanto-kurson, kiu daŭros unu jaron, por kulturaj esperantaj ĉiĉeronoj por la urbo kaj speciale por la 5-a Pacifika esperanto kongreso okazonta en la urbo en 1992.

Lasttempe multaj libroj aperis en Ĉinio. Ni citu: "Atlaso de insekta morfologio, esperanta-latina-ĉina"; "Ĉinaj protektataj bestoj"; "Ĉina antologio"; "Atanomia Nomenklatur".

AKCEPTAJ RETOJ POR VOJAGANTOJ-

La jarlibro de UEA entenas la adresojn de 3 120 delegitoj en 71 landoj. La "Pasporta Servo" donas la eblecon tranokti ĉe 904 gastigantoj en 53 landoj.

La "Amikeca Reto" de SAT, kiu ebligas interesajn rilatojn surloke, havas 268 membrojn en 33 landoj.

TRADUKRETO- Diversaj provoj estas faritaj en pluraj landoj por starigi tradukan reton pere de esperanto. La nova sekretario por la franclingva teritorio estas: S-ro Paul Samain, 9, avenue de Verdun, 60200-Compiègne.

FAKAJ ASOCIOJ- Por kreado de faka asocio, la psikologoj kaj psikoterapiistoj estas invitataj skribi al S-ro Michel Boulet, 41, rue de la Francherie, F-36500 Buzançais.

Por starigo de Esperantista Genealogia kaj Heraldika Asocio, skribu al S-ro Charles M. Hall, P.O. Box 21346, Salt Lake City, Utah 84121, Usono.

Amnesty International

En 1961 du portugalaj studentoj levas siajn glasojn al libereco. Pro la gesto ili estas kondamnitaj al sepjara malliberiĝo. Brita advokato Peter Benenson laŭnome sin direktas en la tujo al la ambasadorejo de Portugalio por protesti. Sed gesto de unuopulo ne efikas. Tiam li pensas pri internacia agado kaj verkas artikolon sub la titolo "Alvoko por amnestio, 1967". Multnombraj reagoj kaj helppropojn estigas la alvoko. En la daŭro de kelkaj monatoj la organizaj bazoj estas starigitaj. Sean McBride fariĝas la unua prezidanto. Jam naskiĝis Amnesty International.

Doktoro Albert Schweitzer, amnesty-ano, skribis en 1963: "Mi opinias, ke paco ekzistos tra la mondo nur kiam la homoj el ĉiuj rasoj, religioj kaj politikaj opinioj povos libere interŝanĝi siajn ideojn laŭ konstanta dialogado". Kaj antaŭ nelonge S-ino Winnie Mandela: "Ni kapablis decide alfronti niajn problemojn dank'al tiaj homoj, kiaj vi. Ni ne solas en longa batalado. Al vi tiun senton ni ŝuldas".

En 1967 A.I. ricevis la Nobel-premion pri paco pro sia tuta agado.

Ĉar miloj da personoj mizeras en malliberejoj pro tio, ke ili senperforte esprimis siajn opiniojn. Aliaj estas enŝlositaj, kvankam nek kulpigitaj, nek juĝotaj. Kelkaj "malaperas" post aresto. Torturo kaj mortpuno estas grandskale uzataj. Politikajn murdojn kulpas armeo kaj policfortoj, alcele kreitaj grupoj, kiuj agas ekster oficiala kontrolo. Sed tiuj "mortoskadronoj" agas kun la komplicejo de la aŭtoritatoj. Tiaj murdoj sisteme praktikataj nomiĝas "eksterjuĝaj ekzekutoj". Oni forĵonglas la pruvojn kaj minacas la atestantojn. Kompreneble la oficialaj aŭtoritatoj neas tiuspecajn murdojn aŭ ilin imputas al sinoponaj terorgrupaĵoj. A.I. atentigas pri tiuj eksterjuĝaj ekzekutoj, malsamaj,

ol la aliaj formoj de mortpuno. La homrajtojn protekti: jen universala tasko ĉiujn ajn landlimojn trapaŝenda. Tiom da nekontesteblaj atencoj kontraŭ la plej fundamentaj rajtoj postulas internacian reagon. La viktimoj de tiaj leĝorompoj kaj iliaj familioj bezonas konkretan efikoplenan helpon. Sur la suprediritaj fundamentaj konvinkoj baziĝas la agado de A.I.

Ĝi enfokusigas apartan flankon de la homrajtoj: la movado zorgas pri difinitaj malliberuloj:

Ĝi klopodas liberigi la proopiniajn malliberulojn, t.e. la enŝlositoj pro siaj ideoj, raso aŭ religio, kondiĉe, ke ili ne estu uzintaj aŭ rekomendintaj rimedojn baziĝantaj sur perforto. Ĝi petadas justajn procesojn por la politikaj malliberuloj kaj interagas favore al la nek kulpigitaj, nek juĝotaj enkarcerigitaj. Ĝi bataladas kontraŭ mortpunon, torturon kaj aliajn nehomajn malnobligajn perfortaĵojn, rilate al ĉiuj ajn malliberuloj. Ĝia agado baziĝas sur la Universala Deklaracio de la Homrajtoj alprenita de la Unuiĝintaj Nacioj en 1948.

Kiel disvolviĝas la agado? La informoj pri la malliberuloj estas kolektataj kaj kiel eble plej zorge kontrolataj de la Centra Esplor-oficejo en Londono. Poste agindas.

La dosieroj rilataj al la malliberuloj estas konfidataj al grupoj de aktivuloj tra la tuta mondo. Tiuj grupoj obstine kaj persiste persekutas la koncernajn registarojn pere de leteroj al tiuj malliberuloj rilatiĝantaj. Kaj la premon ili eĉ plifortigas per sciigo de la inform-respondecujoj kaj publika opinio. Foje en plena rapideco agendas por eviti torturadon aŭ savi homvivojn. Reto de simpatiantoj pretas transsendi vokojn en urĝaj kazoj.

Krome eklanĉo de grandskala agado ebligas amasan intervenon cele al pli decida rezulto. Por premadi la registarojn, A.I. uzas pliajn rimedojn: delegacioj vizitas

la koncernajn registarojn, misioj enketas, publikigaĵoj kaj gazetaraj komunikaĵoj aperas, sentivigitaj kampanjoj estas organizataj, kontaktoj plioftiĝas kun la internaciaj instancoj (U.N.O., Eŭropa Konsilantaro, kaj tiel plu).

Ni notu, ke certaj malliberuloj povas esti unuope adoptataj de du-tri grupoj samtempe. Dum ses monatoj la liberigitoj povas, en okazo de bezono, ricevi helpon de A.I. Helpon ricevas ankaŭ la rifuĝintoj, t.e. tiuj, kiuj, se ili reenlandiĝus, tuj fariĝus proopiniaj malliberuloj. Ni parenteze aldonu, ke A.I. taksas la milit-rifuzantojn proopiniaj malliberuloj.

Ankaŭ teknikaj agadoj necesas. Ilin prenas sur sin profesiuloj (jursciencistoj, sindikatanoj, ĵurnalistoj). Medicinaj grupoj helpas dum la kampanjoj favore al la malsanaj malliberuloj. Ili kuracas la torturitojn kaj diskonigas tiun temaron en la kongresoj pri medicina etiko. Cetere grupoj da instruistoj klopodas enkonduki la instruadon de la homrajtoj en la lernoprogramojn.

Tre demokrate funkcias la Movado. La supera instanco estas la Internacia Konsilio, kiu konsistas el reprezentantoj de ĉiuj sekcioj (ĉiu sekcio respondas apartan landon). La Konsilio voĉdonas por elekti la anojn de ekzekucia komitato, kiu efektivas la strategion elpensitan de la supera instanco.

Sed el kie venas la mono? La nuraj rimedoj estas la membrokotizoj, vendoj kaj abonoj, mondonacoj kaj testamentaĵoj. Por gardi plenan sendependecon A.I. rifuzas ĉiun ajn registaran subvencion, ĉar ĝi rifuzas, ke iu ajn registaro povu ĝin instigi al elekto de laŭdire "bona" aŭ "malbona" malliberulo. Dank'al la subtenado de la publiko kaj agemo de siaj membroj A.I. povas: pritrakti pli da dosieroj de malliberuloj, sendi pli da misioj por enketi, kontroli kaj publikigi pli da informoj, starigi pli grandskalajn kaj pli rapidajn, do pli

efikajn, retojn por interveni.

Nuntage, 700 000 membroj kalkuliĝas en 150 landoj. En 1987, dum ni festis la centjariĝon de Esperanto, 3 534 malliberuloj estis prizorgataj, 2 000 urĝaj alvokoj favoris endanĝerigitajn enkarcerigitojn, 76 misioj ĉeestis procesojn kaj enketis, kaj... milionoj da leteroj estis sendataj.

En la daŭro de dek jaroj pli ol 17 000 novaj dosieroj malfermiĝis; pli ol 15 000 "adoptitoj" de A.I. estis liberigitaj. Unuvorte ĉiu ago, ĉiu donaco utilis.

S. BONIOL, Amnesty-anino

ni ridu

Dum la dua mondmilito iu submara ŝipo de nacio, kiun ni ne citos (vi komprenos poste la kialon!), veturis, kaŝe, ne malproksime al la marbordo de la malamika lando. Subite kapo de arma plonĝisto aperas ĉe la ronda fenestreto. La viro frapas, insiste. Iu suboficiro malfermas la fenestreton por diri: "Eniru!", sed ne la plonĝisto sed la akvo eniris. La submara ŝipo sinkis.

La admiralo koleris kontraŭ la stulteco de iuj.

Post unu monato alia submara ŝipo veturis en la sama loko. Aperis kapo de arma plonĝisto ĉe la fenestreto. La viro insiste frapis. Sed la suboficiro tre bone memoris la parolojn, kaj la koleron de la admiralo. Li ekridis kaj kriis al la frapanto: "Ĉi foje vi ne trompos nin!". Kaj por esti certa, ke la plonĝisto bone aŭdas lin, li malfermas la fenestreton.

Evoluo de la metra sistemo

Antaŭ 1789 la mezurunuoj ne konsistigis sistemon; la rilatoj inter ili estis ege malsimplaj. Jen kelkaj ekzemploj: la valoro de la unuo pri pezaj nomata "funto" egalas du "markojn", poste unu marko valoris ok "uncojn" kaj la "unco" valoris ok "gros", kiu siaflanke sampezis, kiel tri "denaroj", dum unu "denaro" sampezis, kiel dudek kvar "granoj". Unu funto estis $2 \times 8 \times 8 \times 3 \times 24 = 9216$ granoj.

Pri la mono la "pundo" estis nur unuo por la kontoj, sed la materiaj moneroj estis: la ora monero "Louis" (Ludoviko), kiu valoris 24 pundojn, poste la arĝenta monero "ŝildo", kiu valoris 3 pundojn kaj la kupra monero "soldo", 0,05 pundo kaj la denaro, kiu estis la dekduono de soldo. Unu or-monero valoris $24 \times 20 \times 12 = 5760$ denarojn, dum la arĝenta monero valoris $3 \times 20 \times 12 = 720$ denarojn.

Krome la mezuroj ŝanĝiĝis de loko al loko. En Marsejlo unu funto pezis kiel nun 388,5 g., dum en Nimeso ĝi pezis 414,3 g. En Liono la "ordinara" funto pezis kiel nun 418,8 g. sed por la pezo de silko la funto pezis 458,9 g. En Parizo la funto valoris 16 uncojn sed en aliaj lokoj ĝi valoris 12, 14 aŭ 18 uncojn.

La 8-an de majo 1790 laŭ raporto de Talleyrand la nacia konstitucia asembleo dekretis la forigon de la malnovaj mezurunuoj. Unu komisiono, kun Borda, Condorcet, Lagrange, Lavoisier kaj Tillet decidis, ke la novaj unuoj estos decimalaj, tio signifas, de dek unuoj de iu ordo egalvaloros al unuo de la tuj supera ordo. Per tiu reformo, la mezurunuoj havas rilatojn similajn al tiuj de la nombroj, tiel ke per nur translokigo de komo oni povas transformi unu mezuron de iu unuo al alia unuo. Per tiu decido la kreendaj unuoj konsistigos veran sistemon.

Alia komisiono decidis, ke la bazo de la nova sistemo estos la $1/10\,000\,000$ de la kvarono de la longo de la tera meridiano.

La 30-an de marto 1791 la asembleo aprobis la konkludojn de la du komisionoj kaj oni decidis, laŭ propono de la akademio de la sciencoj, ke oni mezuros la meridianon inter Dunkerque kaj Barcelone. Ĉar tiu arko situas ambaŭflanke de la latitudo 45 gradoj kaj krome la du urboj estas ĉe la mar-nivelo. Tiu meridiano estis jam mezurata de Cassini kaj Lacaille en 1740; sufiĉis kontroli la mezurojn.

La 29-an de majo 1793 la akademio de la sciencoj proponis al nova asembleo de la respubliko, ĉar la mezuroj ne sufiĉe rapide progresis, ke oni konstruu provizoran metron laŭ la mezuroj de Cassini kaj Lacaille. La akademio en la sama raporto proponis la ĉefajn partojn de la sistemo: rilato inter la unuoj de longo, de areo, de volumeno, de kapacito kaj eĉ de mono. La Konvencio akceptis tiun proponon kaj la metro tiel konstruita, kiu estas simpla paralelepipedo, kies limoj estas la ekstremoj, estas nun konservata en la muzeo de la artoj kaj metioj en Parizo.

La mezuroj de la meridiano. Delambre mezuris de Dunkerque ĝis Rodez kaj Méchain de Rodez ĝis Barcelone. Temis pri arko de elipso; oni mezuris la latitudojn de ambaŭ urboj kaj oni kalkulis la longon de la kvarono de la meridiano, de ekvatoro ĝis la poluso, akceptante la valoron $1/334$ por la platiĝo de la planedo apud la poluso. La rezultato de tiuj mezuroj kaj kalkuloj estis, ke la kvarono de la meridiano longis 5 130 740 klaftojn, do la tuta meridiano longas 20 522 960 klaftojn. La leĝo de la 7-a de aprilo 1795

Per tiu leĝo la Konvencio nuligis la antaŭan decidon pri la provizora metro, kaj decidis, ke la nova metro estos la rezultato de la novaj mezuroj. La sama leĝo decidis pri la decimalaj rilatoj inter la unuoj, fiksas la nomojn de la unuoj kaj decidis la konstruon de

efektivaj mezuriloj por ĉiuj unuoj kun la duobloj kaj duonoj. Oni decidis la konstruon de normigaj mezuriloj kaj kreis la servon pri kontrolo de la mezuriloj.

La 22-an de junio 1799 (4-an de Mesidoro VII-a jaro de la respubliko) oni deponis en la naciajn arkivojn du normigajn mezurilojn, la metro, kiu estis orta paralelepipedo el plateno, kies longo je la temperaturo 0°C estis la unuo; la aliaj dimensioj de la paralelepipedo estas 0,02m. larĝa kaj 0,005m. dika; la alia mezurilo estis cilindro el plateno, kiu estas la kilogramo, oficiala normigo por la masoj.

La 3-an de novembro 1801 oni aprobis la tutan sistemon de mezuroj, kiujn ni poste studos. Do je la fino de la 18-a jarcento la tuta metra sistemo estis kreita kaj aprobita.

La principoj de la metra sistemo


La mezuroj pri longo: ili estas, laŭ la decido de la akademio pri sciencoj, la bazo de la tuta sistemo. La ĉefa unuo estas la metro, pri kiu oni jam sufiĉe parolis, kaj la aliaj unuoj, laŭ la decimala principo estas la dekametro=10m, la hektometro=100m., kaj la kilometro=1000m. La pli malgrandaj unuoj estas la decimetrom=0,1m., la centimetrom=0,01m. kaj la milimetrom=0,001m. La mezuroj pri areoj: la unuoj estas kvadratoj, kies longo de lateroj estas la unuoj por la longo-mezuro. Do la ĉefa unuo estas la kvadrata metro, poste venas la kvadrata dekametro (aŭ aro), la kvadrata hektometro (aŭ hektaro) kaj kompreneble la kvadrata kilometro.

La mezuroj pri volumenoj sekvas la saman principon, sed tiam, ĉiu unuo egalas milfoje la tujan pli malgrandan unuon. Ekzemple, en unu kuba metro estas 1000 dm³, k.t.p. Kompreneble por anstataŭi la malnovajn unuojn, oni bezonis similajn unuojn kaj decidis krei novajn unuojn por la mezuro de la likvaĵoj kaj solidoj en grajnoj. Oni ofte nomas tiujn: unuoj de kapacito, sed tiu esprimo estas malĝusta. La kapacito kvalifikas

ujon, kies kapacito estas la maksimuma volumeno, kiun ĝi povas enteni. Ekzemple, por mezuri la volumenon de likvaĵo, kiu estas en sitelo, oni povas ĉerpi ĝin per ujo, kies kapacito estas unu litro. Se la likvaĵo plenigas ekzakte kvarfoje la unulitran ujon, tiam oni povas aserti, ke la volumeno de la likvaĵo estas 4 litroj. Sed estus stulte diri, ke la kapacito de la likvaĵo estas 4 litroj. La tiel erare nomataj unuoj de kapacito baziĝas sur la litro, kiu estas la kapacito de ujo, kiu povas maksimume enteni unu kuban decimetron de iu ajn fluidaĵo. Kompreneble, la aliaj unuoj estas same nomataj: dekalitro, hektolitro kaj kilolitro, kaj inverse, decilitro, centilitro kaj mililitro.

La mezuroj de la masoj. Por ke la sistemo estu kohera oni elektis la ĉefan unuon pere de la volumenoj kaj de iu baza substanco. La gramo estas la maso de unu kuba centimetrom de akvo, je la temperaturo de 4°C , kiu estas maksimumo por la volumena maso de la akvo. Pere de tiu principo oni konstruis, ne iun gramon, sed la objekton pri kiu mi jam aludis, la platenan cilindron, kies maso estas la maso de unu litro da akvo kaj kiu laŭdifine estas la kilogramo. Kompreneble la sama regulo valoras por la prefiksoj, kiel por la longoj, de la kilogramo al la miligramo. Por mezuri la masojn oni uzas pesilon kaj pezilojn; tial oni konstruis arojn da peziloj por rapide ekvilibri ĉiujn pesatajn objektojn. Speciale menciinda estas la skatola pezilaro.

F. BOYET



La Kirurgio

antaŭ 5000 jaroj

La ĝenerala opinio, ke la medicina scienco evoluis nur dum la lastaj jarcentoj de nia historio, estas plene refutita per la deĉifro de malnov-egipta papiruso, kiun oni skribis en la deksepa jarcento antaŭ Kristo. Ĉi tiu skribaĵo pri la kirurgio en pratempoj, laŭ ĵus finiĝintaj esploroj, rilatas kun certeco al fontoj de kvarmil jaroj antaŭ nia jarkalkulo. Tion konkludis la tradukinto de la dokumento, profesoro James H. Breasted de la universitato de Ĉikago, el la fakto, ke en ĝi ofte troviĝas esprimoj, kiuj jam estis malnoviĝintaj dum la verkado de la dokumento kaj tial ili estis klarigitaj en specialaj notoj aldonitaj al la tekstoj. Dua indiko pri tio estas piramida skribaĵo el la dudekoka jarcento antaŭ Kristo, en kiu oni menciis, ke tiutempe "la ĉefo de la konstruistoj havis akcidenton, dum li montris la konstruajn laborojn al la faraono. Ĉi tiu tiam ordonis alporti la "skribaĵojn", por ke, li esploru, per kiuj rimedoj oni povus helpi la vunditan konstruiston. Tio do estas pruvo, ke en tiu tempo ekzistis instrukcioj pri la kuracado de malsanuloj.

La trovaĵo de Tebe- La nomita papiruso cetere ne estas la sola dokumento, kiun oni trovis pri medicinaj aferoj. Nuntempe oni konas kvar tiajn skribaĵojn, devenajn el plej diversaj epokoj. Tamen la plej malnova estas verŝajne la de profesoro Breasted tradukita dokumento, kiu havis longecon de kvin metroj, sed origine eble estis pli longa. La loko, kie la skribaĵo estis trovata, ne estas konata. Supozeble ĝi devenas el tombo apud Tebe, kie trovis ĝin iu komercisto de antikvaĵoj.. Ĉi tiu verŝajne poste forprenis la nedifektitajn partojn de la rulaĵo kaj kungluis la restaĵojn por akiri duan dokumenton. Ambaŭ papirusoj estis aĉetitaj de la amerika egiptologo

Edwin Smith. Ĉi tiu, kiu povis legi ne nur la hieroglifojn, sed ankaŭ la malnovan egiptan kursivan skribon, tuj komprenis la grandan valoron de la skribaĵoj. Li solvis la gluon de la kungluitaj partoj kaj multe penadis aranĝi ilin laŭ la ĝusta sinsekvo. Terura laboro, sed fine ĝi sukcesis. La kolonoj havas longecon de 35 centimetroj kaj estis preskaŭ samlarĝaj. La skribo estas bela kaj regula, certe laboro de sperta skribisto, kvankam ne lerta en fakaj esprimoj, kiel pravas la multaj korektoj, kiujn li poste faris.

La dokumento estas traktaĵo pri ekstera kuracarto, kirurgio kaj pritrakto de vundoj. Ĝi komenciĝas per la kapo kaj tiam sisteme pritraktas la pli malaltajn korpopartojn, ĉe kiuj estas pritraktataj ankaŭ lezaĵoj de nazo, makzeloj, oreloj, lipoj, gorĝo, kolo, klaviklo, torako kaj spino.

La verkinto unue priskribas la apartajn simptomojn, tiam la diagnozon kaj finas per la terapio aŭ per mencio de la akiritaj rezultatoj. Laŭ siaj prognozoj, favora, duba aŭ malfavora, li donas ĉiam unu el la tri juĝoj: malsano, kiun mi povas trakti; malsano, kiun mi volas kontraŭbatali; malsano, kiun mi ne konas kaj pri kiu mi ne havas spertojn.

La traktado estas simpla, kaj en la plej multaj kazoj tre prudenta. Por krurorompigoj ekzemple li donis precizajn indikojn pri splitbandaĵoj. Malfermaj vundoj estas traktataj per unĝento, konsistanta el mielo kaj adstringaj herboj. Pri malsanoj, kiujn la tiamaj kuracistoj ankoraŭ ne povis difini, ne estas priskribitaj medikamentoj, sed donita la konsilo: "meti la pacienton en komfortan pozicion kaj lasi la kuracadon al la naturo".

Ofte la precizeco de la preskriboj estas miriga. Precipe pri la traktado de membroj, kiuj elartikiĝis. Ekzemple en kazo de elartikiĝo de makzelo la dokumento donas plej detalajn instrukciojn, kiel kaj

kien la kuracisto devas meti siajn manojn por reĝustigi la makzelon. Ĉe elartikiĝo de klaviklo kaj ŝultroj la konsilo estas kuŝigi la pacienton sur la dorson kaj streĉi liajn brakojn, "por ke la ŝultroj estu streĉataj, ĝis la elartikiĝinta parto denove reiros al la ĝusta loko".

Ĉe kranio-rompiĝo la kuracisto ricevas la konsilon fabrikigi per kusenetoj tegitan pinĉilon el ligno por kunpinĉi per ĝi la kapon. La malsanulo devas tiam resti sidanta kaj ambaŭflanke apogata, ĝis la resaniĝo.

Oni konis la funkcion de la cerbo. Ĉi tio estas des pli miriga, ĉar nek en la Malnova Testamento, nek en la asiraj kaj babilonaj malnovaj skribaĵoj estas io trovebla pri la homa cerbo. La papiruso tradukita de profesoro Breasted entenas ne nur ĝeneralan priskribon de la cerbo, sed ankaŭ precizan klarigon pri la funkciado de la granda kaj malgranda cerboj.

Sed la malnov-egiptaj kuracistoj sciis ankaŭ multajn aliajn aferojn. Ili ekzemple ankaŭ konis la sang-cirkuladon. Pri tiu temo la papiruso de Edwin Smith diras: "El la koro iras kanalo al ĉiu parto de la korpo, eĉ al la plej malproksima. Se la doktoro metas sian fingron sur la malantaŭon de la kapo, sur la manojn, sur la pulson aŭ sur la krurojn de la malsanulo, li sentas la baton de la koro, ĉar ĝi estas ligita kun ĉiu membro kaj ĝi "parolas" en ĉiuj siaj kanaloj". Pri la klavikloj la manuskripto diras: "Sub ili iras du arterioj, unu dekstre kaj la alia maldekstre de la kolo; ĉi tiuj iras al ambaŭ pulmoj". El tiaj indikoj pri la funkciado de la sangovazoj evidentiĝas, ke la egiptoj, verŝajne pro la kutimo de la balzamado, posedis grandan scion pri la funkciadoj de la diversaj organoj de nia korpo. Plinius eĉ mencias, ke en dubaj kazoj, se oni ne trovis la kaŭzon de la morto, devas okazi oficiala sekcado.

Tre surprizaj estas la instrumentoj, per kiuj la egiptoj faris operaciojn! Ili estas faritaj el metalo, facile manipuleblaj kaj tre adapteblaj. La kuracistoj jam konis la cezaran operacion kaj ili ankaŭ faris cerbo-operaciojn, kio estas pruvita de mumioj. Ekzistas sur tiu tereno kelkaj pentraĵoj kaj tombo-ŝtonoj, kiuj bildigis tion. Krom tio la egiptaj amas-tomboj donas interesajn faktojn pri la medicina scienco kaj mirigaj kuracadoj. Oni konstatis ekzemple en tombejoj de 5 000 mortintoj ĉe multaj skeletoj postsignojn de kuracitaj krur-rompiĝoj.

Treege interesaj estas ankaŭ la komunikoj pri la akcidentoj ĉe la konstruo de la piramidoj. Unu el ili mencias, ke iu viro falis kaj perdis la aŭd- kaj vid-kapablojn, kaj krom tio liaj brakoj kaj kruroj paraliziĝis. La kuracisto konstatis "komplikitajn lezaĵojn de la kol-vertebro" kaj laŭ tiu diagnozo traktis la malsanulon. La dokumento donas ankaŭ indikojn por la traktado de lezaĵoj de la spino. Ankaŭ estas tuta serio da receptoj kontraŭ virinaj malsanoj kaj eĉ priskribo de metodoj por plijuniĝi! Kaj eĉ pli oni miras, kiam oni legas diagnozon de malsano, kies simptomoj estas plej verŝajne tiuj de kancero.

En la malnovaj tempoj la kuracistoj estas tre alte respektataj. En la Odiseo, Homero nomas Egiption "lando, kies fruktodona tero produktas multajn herbojn, sanigajn kaj pereigajn kaj ankaŭ lando, kie ĉiu kuracisto estas pli ol ĉiuj aliaj homoj riĉa je kono". Plinius diris, ke oni povis trovi en tiu lando pli da kirurgoj ol en kiu ajn alia lando.

Kiam la greka historiisto Herodoto vizitis Egiption li estis surprizita pri la vasta specialiĝo de la medicina scienco. Li skribis: "La kuracarto estas tiel dividita, ke ĉiu kuracisto okupas sin nur pri unu malsano. Ĉie estas kuracistoj, unuj por la okuloj, aliaj por la

kapo, denove aliaj por la dentoj, specialaj por la organoj en la ventro kaj ankaŭ kelkaj por internaj malsanoj". Kaj tio estis tiel antaŭ preskaŭ 2 500 jaroj! Estas ĝuste, kion la profesiuloj diras pri la malkovroj de la papirusa dokumento. Profesoro Sailey el Filadelfio, mondfama scienculo, opinias, kaj multaj aliaj liaj kolegoj same opinias: "Ni devas revizii nian antaŭan juĝon pri sciencaj metodoj de la malnovaj egiptoj. La skribintoj de ĉi tiuj medicinaj notoj sendube apartenis al grupo de kuracistoj, kiuj jam tiam sciis, ke en la medicino ekzistas komplekso de aperaĵoj, kiuj devas esti akurate observataj kaj priskribataj. Tial ili kolektis

siajn konkludojn kaj faris el ili ĉi tiun registron, parte por helpi la suferantojn, parte pro scienca intereso. Sendube la nekonataj viroj, kiuj kunlaboris por tiuj skribaĵoj, estis la unuaj natur-esploristoj, pri kiuj ni aŭdis el tiu tempo. Kaj ankaŭ pro tio la papirusa dokumento de Smith havas krom la medicina ankaŭ grandegan kulturhistorian valoron."

(Wereldkroniek)

Tiu artikolo aperis jam en la revuo "La Praktiko" en 1954.

Senmaskigu la pseŭdonimojn

Ekde la estiĝo de la Esperantomovado pluraj verkantoj, tradukantoj kaj aliaj funkciuloj de la organiza kaj kultura vivo en Esperantujo kaŝis sin malantaŭ pseŭdonimoj aŭ plumnomoj. La esperantisto, kiu iniciatis tiun kutimon estis, sen ia ombro de dubo, d-ro Esperanto, la pseŭdonimo kaŝanta d-ron L.L. Zamenhof. Por partopreni en kvizo pri dek pseŭdonimuloj, kiuj rolis/rolas en la kultura vido de la Esperanta lingvokomunumo, legu la sekvajn dudek nomojn kaj provu rearanĝi ilin, parigante la kaŝnomon kun la vera nomo. Inter la dek homoj estas po unu anglo, aŭstro, belgo, bulgaro, franco hungaro, italo, polo, ruso kaj sviso. Nur unu el la dek estas virino.

- 1- Otto MASCHL
- 2- Marin LJUBIN
- 3- Lali BLOND
- 4- Petro STOJAN
- 5- Valerio ARI
- 6- Arie BEN GUNI
- 7- Jan FETHKE
- 8- Tazio CARLEVARO
- 9- Jean FORGE
- 10- Nenjo RIMANTO
- 11- Lucien LAURAT
- 12- Gaston WARINGHIEN
- 13- Maria PRANICKA
- 14- Johan VALANO
- 15- Asen GRIGOROV
- 16- Giorgio SILFER
- 17- Ellen GREGORY
- 18- Edo BERNASCONI
- 19- Claude PIRON
- 20- Lajos (Ludoviko) TOTSCHKE/TARKONY

RESTAS NUR KELKAJ TAGOJ

al vi por pagi vian abonon 1990

Vi povos eviti al ni kroman laboron

PAGU TUJ

RESPONDOJ-

- 1- Giorgio SILFER = Valerio ARI. Li estas italo. Dum pluraj jaroj li estis la ĉefredaktoro de la revuo LITERATURA FOIRO. Nun li oficas, kiel la ĝenerala direktoro de LF-KOOP en La Chaux-de-Fonds.
- 2- Edo BERNASCONI = Tazio CARLEVARO. Li naskiĝis en 1945 en Tiĉino, Svislando. Profesie li estas kuracisto, specialisto pri la psikiatrio. Krom Esperanto li okupiĝas ankaŭ pri la historio de aliaj planlingvoj.
- 3- Jean FORGE = Jan FETHKE (1903-1980). Li naskiĝis en Pollando kaj laboris en Berlino, kiel film-reĝisoro. Li estas plej bone konata en Esperantujo, kiel aŭtoro de fantaziaj aventur-romanoj kaj noveloj verkitaj originale en Esperanto.
- 4- Nenjo RIMANTO = Ellen GREGORY (1891-1976). Ŝi estis angla esperantistino, kiu aktivis dum pli ol 65 jaroj, kiel instruanto kaj verkanto. Ŝiaj libroj en Esperanto por junaj infanoj aperis sub ŝia plumnomo.
- 5- Marin LJUBIN = Asen GRIGOROV (1903-1985). Li naskiĝis en Bulgario kaj laboris, kiel ĵurnalisto. Li tradukis bulgarajn beletraĵojn en Esperanton, redaktis revuojn kaj verkis originalajn novelojn kaj poemojn en Esperanto pri proletaj temoj.
- 6- Lucien LAURAT = Otto MASCHL (1898-1973). Li naskiĝis en Aŭstrio, estis kamarado kaj subtenanto de Eŭgeno Lanti kaj fariĝis aktiva membro de Sennacieca Asocio Tutmonda ekde ĝia fondo. En la jaroj 1923-1927 li estis profesoro pri politika ekonomio en Moskvo, kaj inter 1932-1939 li instruis en laborista altlernejo en Parizo;
- 7- Johan VALANO = Claude PIRON. Li naskiĝis en 1931 en Belgio kaj nuntempe loĝas en Svislando. Dum pluraj jaroj li laboris, kiel tradukisto ĉe la Unuiĝintaj Nacioj. Li verkis originalajn poemojn kaj estas konata ankaŭ, kiel aŭtoro de krim-romanoj.

8- Maria PRANICKA = Petro STOJAN (1884-1961). Li naskiĝis en Besarabio, tiutempe parto de Ukrainio. Post mezlernejaj kaj universitataj sciencaj studoj, li okupiĝis pri ruslingva leksikografia laboro. Lia plej grava verko en Esperanto estas BIBLIOGRAFIO DE INTERNACIA LINGVO, eldonita en 1929.

9- Lali BLOND = Lajos aŭ Ludoviko TOTSCHÉ/TARKONY (1902-1978). Li estis hungara oficisto, kiu aktivis, kiel esperantisto en la Budapeŝta Skolo. Li estas plej konata, kiel poeto, sed li ankaŭ tradukis hungarajn novelojn en Esperanton kaj verkis studaĵon pri la Esperanta literaturo.

10- Arieĥ BEN GUNI = Gaston WARINGHIEN. Li naskiĝis en Francio en 1901 kaj estis agregacia profesoro. Li ĉefredaktoris LA NICA LITERATURA REVUO, tradukis multajn poeziajn verkojn en Esperanton, verkis eseojn pri la esperantologio kaj faris valorajn kontribuojn al la leksikografio de Esperanto.

(Ĝisdatigita: majo 1990)

Bernard GOLDEN

CENTJARA DATREVENO de la naskiĝo de



Kalocsay, Kolomano

MONTE KRISTO

Alexandre DUMAS

(Parto de la traduko de ROLAND DUPUIS)

Nun malleviĝis ĉiuj veloj kaj la ŝipo preskaŭ nerimarkeble plu glitis antaŭen.

"Ĉu vi nun deziras supreniri, sinjoro Morrel?" demandis Dantes, rimarkinte la malpaciencon de l'ŝipekipisto, "jen via librotenisto s-ro Danglars, kiu eliras el sia kajuto; li povos informi pri ĉio laŭ via deziro. Mi mem devas nun atenti pri la ankrado kaj fari la funebran aranĝon." La ŝipekipisto ne atendis ripeton de la propono. Li kaptis kablون, kiun ĵetis al li Dantes, kaj kun lerto, kiu honorigus mariston, li suprengrimpis la ŝtupojn najlitajn en la konvekso ŝipflanko, dum la junulo revenis al sia subkapitanejo, lasante konversacieblon al la jam anoncita Danglars, kiu efektive paŝis renkonte al la ŝipekipisto. La alvenanto estis viro dudek kvin aŭ dudekses jara kun vizaĝo iom malhela, tro ĝentila al la superuloj sed insultema al la subuloj; pro tio kaj ankaŭ ĉar tia librotenista funkcio ĉiam malplaĉas al la maristoj, la ŝipanaro malŝatis lin same profunde, kiel ili ŝatis Dantes.

"Nu, sinjoro Morrel" diris Danglars, "vi scias pri nia malfeliĉo, ĉu ne?" - "Ho, jes. Kompatinda kapitano Leclere! Li estis brava kaj honesta viro!" - "Kaj ĉefe bonega maristo maljuniĝinta inter akvo kaj ĉielo, tiel ke li povis dece servadi la respektindan firmon Morrel kaj Filo," respondis Danglars.

"Sed, respondis la ŝipekipisto, kies rigardo sekvis Dantes okupatan de ankrado, ŝajnas al mi, ke ne tiel necesas maljunaĝo por tute regi sian profesion. Vidu nur amikon Edmundo zorgantan pri sia laboro; li tre verŝajne bezonas nenies konsilojn" - "Ho certe ne, diris

Danglars, direktante al Dantes oblikvan rigardon de malame fajrantaj okuloj; jen maristeto memfida. Tuj post la morto de la kapitano, sen iu ajn konsulto, li komencis ordonadi kaj kaŭzis al ni perdon de unu kaj duona tago ĉe insulo Elbo anstataŭ rekte veturi al Marsejlo" - "Nu, anstataŭi la kapitanon, diris la ŝipekipisto, tio estis lia devo de subestro; sed atendi unu tagon kaj duonon ĉe Elbo estas riproĉinde se ne postulite pro averio tuj riparenda." - "La ŝipo fartis same bone, kiel mi mem kaj kiel mi deziras, ke vi fartu, sinjoro Morrel; tiuj tridek-ses horoj perdiĝis nur kaŭze de kaprico".

"Dantes, vokis la ŝipekipisto turniĝinta al la junulo, venu do ĉi tien." - "Pardonu momenton, sinjoro, respondis Dantes" Kaj li ordonis al la ŝipanaro: "Ankro malsupren!" Tuj falis la pecego, kies ĉenego brue glitsekvis. Malgraŭ la ĉeesto de l'piloto, Dantes daŭre restis surloke ĝis la fino de tiu lasta manovro; post kio li aldonis: "Flagrubando duon-alten, flago same, krucigu la velstangojn!" - "Jen vi vidas, diris Danglars, evidente li jam imagas sin kapitano." - "Tio li fakte estas, deklaris la ŝipekipisto." - "Tamen kondiĉe, ke vi kaj via kunsocietano tion subskribas, sinjoro Morrel" - "Nu, kial ni forprenus de li tiun kapitanecon? demandis la ŝipekipisto. Mi ja scias, ke li estas juna, sed li ŝajnas al mi kaj sindona kaj fake sperta." Nubo trapasis la frunton de Danglars.

"Pardonu, sinjoro Morrel, diris Dantes alproksimiĝante, ĉar mi unue devis ankri; nun mi estas je via dispono; vi min alvokis, ĉu ne?" Danglars faris paŝon malantaŭen "Mi volis demandi al vi, kial vi haltis ĉe Elbo." - "Tion mi ne scias, sinjoro; sed necesis, ke mi plenumu la lastan ordonon de kapitano Leclere, kiu, je morto, donis al mi paketon por la granda marŝalo Bertrand." - "Ĉu vi lin vidis, Edmundo?" - "Kiun?" - "La grandan marŝalon." - "Jes." Morrel rigardis ĉirkaŭen kaj tiris

Dantes iomete for. "Kaj kiel fartas la imperiestro?" li rapide demandis. "Nu bone, laŭ mia perokula juĝo." - "Vi do vidis ankaŭ la imperiestron, ĉu ne?" - "Li paŝis al la marŝalo en mia ĉeesto." - "Ĉu vi parolis al li?" - "Pli ĝuste dirite, li parolis al mi, sinjoro, respondis Dantes ridetante. Li min demandis pri la ŝipo, pri la tempo de ĝia forveturo al Marsejlo, pri la sekvita vojo kaj la ŝarĝo transportata. Mi kredas, ke se ĝi tiam estus malplena kaj se mi estus la posedanto li volus ĝin aĉeti; sed mi diris al li, ke mi estas nur subkapitano, kaj ke la ŝipo apartenas al la firmo Morrel kaj Filo. Tiam li diris: "Ha, ha! tiun firmon mi konas. La firmo Morrel ekzistas de pluraj generacioj, kaj iu Morrel servis en mia regimento, kiam ni restis garnizone en Valencio." - "Diable ĝuste! ekkriis la ŝipekipisto tute gajiĝante. Estis mia onklo Policar Morrel, kapitano. Dantes vi diru al mia onklo, ke la imperiestro lin memoras; tiam vi vidos, kiel veterano ploras! Nu, daŭrigis la ŝipekipisto kun amika gesto sur la ŝultro de la junulo, vi prave haltis ĉe Elbo, ĉar vi plenumis la instrukciojn de kapitano Leclere kvankam vi povus kompromitiĝi se aliuloj ekscius, ke vi transdonis paketon al la marŝalo kaj parolis kun la imperiestro" - "Sed, kial, sinjoro, tio min kompromitu? demandis Dantes; mi eĉ ne scias, kion mi portis, kaj la imperiestro faris al mi nur demandojn, kiujn li farus al iu ajn. Sed pardonu, li daŭrigis; jen alvenas la sanservo-reprezentantoj kaj la doganoficistoj; vi permesas, ĉu ne?" - "Bonvolu, mia kara."

La junulo malproksimiĝis kaj tiam revenis Danglars. "Nu, li demandis, ŝajnas, ke liaj klarigoj pravigas lian ankradon en Porto-Ferraĵo, ĉu ne?" - "Tute pravigas, kara sinjoro Danglars." "Ha bonege, diris tiu, ĉar estu malĝojige konstati la kulpecon de kamarado." - "Dantes estas senkulpa kaj meritas neniun riproĉon, respondis la ŝipekipisto; ordonon pri tiu halto li estis ricevinta

de kapitano Leclere." - "Rilate la kapitanon Leclere, ĉu li ne donis al vi lian leteron?" - "Kiu?" - "Dantes" - "Al mi, ne! Ĉu do ekzistas iu letero?" - "Mi kredis, ke krom la paketo, kapitano Leclere konfidis al li leteron." "Pri kiu paketo vi parolas, Danglars?" "Nu pri tiu, kiun Dantes fordonis en Porto-Ferraĵo, okaze de la halto." - "Kiel vi ekciis, ke estas paketo ellasenda en Porto-Ferraĵo?"

Danglars ruĝiĝis. "Ho mi preterpasis la malfermetan pordon de l'kapitano kaj vidis lin doni al Dantes paketon kaj leteron." - "Pri tio li ne parolis al mi, diris la ŝipekipisto, sed se li havas tiun leteron, li certe donos ĝin al mi."

Danglars pripensis momenton. "Tiuokaze sinjoro Morrel, mi petas, ke vi nenion diru pri tio al Dantes. Verŝajne mi eraris."

Nun revenis la junulo; tiam Danglars malproksimiĝis. "Nu mia kara Dantes, ĉu vi estas libera? demandis la ŝipekipisto. "Jes, sinjoro" - "La formalajoj ne postulis multe da tempo." - "Ne; mi donis al la doganistoj la liston de niaj varoj; kaj al la sanservo mi jam havigis la dokumentojn pere de ĝia deĵoranto, kiam li venis kun la piloto." - "Vi do ne plu havas laboron ĉi tie, ĉu?"


Dantes rapide rigardis ĉirkaŭen. "Ne, ĉio estas nun en ordo." - "Vi do povas veni kun mi por tagmanĝi en mia hejmo?" - "Ho, pardonu, sinjoro Morrel, pardonu mi vin petas; mi tre alte taksas vian inviton, sed la unuan viziton mi ŝuldas al mia patro." - "Tute prave, Dantes, tute prave. Mi scias, ke vi estas bona filo." - "Kaj ĉu vi ne kredas, ke mia patro bone fartas? demandis Dantes iom hezite. "Ho, tion mi kredas, kara Edmundo, kvankam mi ne renkontis lin." - "Li ja plej ofte restas en sia ĉambreto" - "Tio almenaŭ pravas, ke mankis al li nenio dum via foresto!" "Mia patro estas fiera, sinjoro; eĉ se mankus al li ĉio li sendube petus al neniuj, escepte al Dio."

"Nu, post tiu unua vizito ni vin atendos." - "Pardonu min denove, sinjoro Morrel; sed post tiu unua vizito estos dua, kiun mia koro ne malpli deziras." - "Ha, kompreneble Dantes; mi forgesis, ke atendas vin, en la Kataluna Kvartalo, iu, kiu malpacienças, kiel via patro: la bela Mercedes." Dantes ridetis. "Ha, ha, daŭrigis la ŝipekipisto, ne plu mirigas min, ke ŝi trifoje venis por ekscii pri la ŝipo Faraono. Diable! Edmundo mi ne kompatos vin: vi havas tiel belan amvirinon!" "Amvirino ŝi ne estas, sinjoro, grave respondis la maristo; ŝi estas mia fianĉino." - "Kelkfoje estas same," ridis la ŝipekipisto. "Ne ĉe ni, sinjoro," respondis Dantes." Nu tiam, Edmundo kara, mi ne plu retenu vin; vi tiel bone prizorgis miajn aferojn, ke mi nun ja volas faciligi al vi viajn proprajn. Ĉu vi bezonas monon?" "Ne, sinjoro; mi daŭre havas mian tutan vojaĝsalajron, tio estas por tri monatoj." - "Vi estas modela junulo, Edmundo." - "Aldonu, ke mi havas malriĉan patron, sinjoro Morrel." - "Jes; sed mi scias, ke vi estas ankaŭ modela filo. Iru do al via patro; ankaŭ mi havas filon, kaj mi kolerus al tiu, kiu lin retenus for de mi post vojaĝo trimonata." - "Vi do permesas, ĉu ne?" demandis la junulo, salutante. "Jes, se vi diris ĉion endan." - "Jes." - Ĉu kapitano Leclere, ĵus antaŭ morto, ne donis al vi leteron por mi?" - "Li tiam eĉ skribi ne povus; sed tio memorigas al mi, ke mi devas peti de vi dusemajnan liberton." - "Ĉu por edziĝi?" - "Jes unue...sed due, por iri al Parizo." - "Konsentite; vi disponu pri tiom da tempo, kiom vi bezonas, Dantes. La malŝargado de la ŝipo ja daŭros proksimume ses semajnojn kaj ni ne realmariĝos antaŭ tri monatoj... Sed post tiuj tri monatoj vi devos esti ĉi tie. La Faraono," aldonis la ŝipekipisto, frapetante la ŝultron de la junulo, "ne povus reekveturi sen sia kapitano." "Sen sia kapitano!" ekkriis Dantes kun ĝojbrilaj okuloj; ĉu vi bone pripensis vian eldiron, sinjoro?"

"Se mia decido sufiĉas, kara Dantes, mi tuj etendus al vi la manon kaj dirus: Farite; sed mi havas kunsocietanon, kaj vi ja konas la italan proverbon:" Che a compagno a padrone", kiu havas kunestron, tiu havas mastron. Tamen jam duonfarite; el du voĉoj vi jam ricevis unu. Fidu al mi por gajni la alian; mi faros mian eblon." - "Ho, sinjoro Morrel", ekkriis la juna maristo kaptinte, kun larmoj en la okuloj, la manojn de la ŝipekipisto; je la nomo de mia patro kaj je la nomo de Mercedes, mi dankas vin" - "Bone, bone, Edmundo; estas Dio en la ĉielo por la bravuloj! Iru al via patro, iru al Mercedes kaj revenu al mi poste." - "Sed ĉu vi ne volas, ke mi rekonduku vin al la kajo?" - "Ne, dankon; mi restas por aranĝi miajn kalkulojn kun Danglars. Ĉu vi estis kontenta pri li dum la vojaĝo?" - "Dependas de la senco de via demando. Laŭ kamaradeca vidpunkto, ne; li ŝajne malŝatas min de la tago, kiam, pro kvereleto, mi stulte proponis al li dekminutan halton en la insulo Monte-Kristo por fini la disputon; propono, kiun mi cetere malprave faris, kaj kiun li prave rifuzis. Laŭ librotenista vidpunkto estas neniu kritiko por fari kaj vi estos kontenta pri lia laboro." - "Sed," demandis la ŝipekipisto, "diru, Dantes, se vi estus kapitano de la Faraono, ĉu vi retenus lin kun plezuro?" - "Kiel kapitano same, kiel subkapitano, respondis Dantes, mi ĉiam respektos tiujn, kiuj ĝuas la estimon de miaj mastroj." - "Nu, Dantes, mi vidas, ke vi ĉiurilate estas bravegulo. Mi ne plu retenu vin; iru do; vi aspektas staranta sur pingloj." - "Ĉu mi nun estas libera?" - "Iru, mi ripetas." - "Ĉu vi permesas, ke mi uzu vian kanoton?" - "Uzu ĝin" - "Ĝis revido, sinjoro Morrel, kaj dankon, milfoje!" "Ĝis revido, kara Edmundo, bonŝancon al vi."


La juna maristo saltis en la kanoton, paŝis al ĝia malantaŭo, eksidis. Du maristoj tuj kliniĝis al siaj remiloj kaj la boateto forglitis.

POR VIA DISTRO



NOVA ENIGMO

Ŝerce miscitita proverbo: KIE DU INTERBATALAS... daŭrigo en la krucenigmo.



HORIZONTALE- A- Tuŝo per lipoj; maldura. B- Dorlotata; estigi; japana vestaĵo. C- Ŝanĝos pozicion de io; estanta en nia lando; rilata al ĉefurbo. Ĉ- Krustoj de arboj; loĝant' de Italio; esprim' de ŝulda sento; orsimile. D- Ŝipaj "ventotukoj"; prepozicio; maljuna; trinkvaz'; reĝo de la Hunoj. E- Haŭta malmolaĵo; kaŭzo; nedifina pronomo; merginte lavas; komunikigi per vortoj. F- Rilata al azia ŝtato; akvoŝvelo; fabela giganto; Tutlanda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj; grapol'. G- LA KAŜITA FRAZO. Ĝ- Literoj "A"; unu el la tri musketistoj; restigata; ero de skeleto; ĉambro, loko.

VERTIKALE- 1- Demanda adjektivo. 2- Urbo en Bulgario. 3- Speco de lako. 4- Rilataj al sukoplenaj fruktoj. 5- Parto de la homa korpo; kunordiga konjunkcio. 6- Malplenaĵoj en solida materio; kemia simbolo de tantalio. 7- Moviĝoj per paŝoj; barita spac'. 8- Numeralo; speco de pino. 9- Kemia simbolo de osmio; paŝe moviĝadas. 10- Afrika parhuful'. 11- Azena bleko; nulo; konjunkcio. 12- Moviĝo malsupren; sufikso de slavaj virinaj nomoj. 13- Prepozicio; fiksas per ŝnuroj. 14- Kemia simbolo de radiumo; malantaŭa. 15- Meritanta; ripetiĝanta. 16- Prepozicio; kemia simbolo de boro; aŭtosimbolo de Argentino. 17- Parolata kun melodio. 18- Persona pronomo; divano. 19- Mezurunuo; sagrapidos. 20- Loteria bileto; stat' de la konscio. 21- Membrara; litero "R". 22- Malgranda kokinprodukt'; internacia prefikso. 23- Acidsimile. 24- Lok'. 25- Rivero en Slovakio. 26- Piede moviĝi.

LA VIVO EN GRESILLON GRAVE!

EK DE LA 15.a DE NOVEMBRO LA ADRESO DE LA REVUO

ESTOS:

KULTURAJ KAJEROJ - P. BABIN

Le Haut des Bourrelières

17, rue Romain Rolland

85100-Le Château d'Olonne

(La numero de la poŝtkonto ne ŝanĝiĝas)

NI FUNEBRAS

MORTIS AUDREY CHILDS-MEE

Ni estis informitaj pri ŝia forpaso tro malfrue kaj ne povis ĝin anonci en nia junia numero. Ne diskuteble valora instruisto ŝi estis. Ĉiuj lernantoj, kiuj fervore ĉeestis ŝiajn kursojn en diversaj landoj kaj ankaŭ, plurjare, en la Esperanto-Domo Gresillon, ankoraŭ ne alkutimiĝis al la ideo, ke ili ne plu aŭdos ŝian voĉon, nek ŝiajn ridojn, nek ŝiajn kantojn. Por ni, gvidantoj de Gresillon, ŝi estis ankaŭ tre kara amikino. Tuŝis nin, ke ŝi atentis pri la infanoj; ŝi verkis "La geknaboj de Greziljono" kaj regule verkis por Kulturaj Kajeroj specialan paĝon "Por la geknaboj".

Audrey, vi lasas profundajn spurojn en la movado ĝenerale, kaj ankaŭ en niaj koroj. Dankon pro tio.

Komitatkunveno - Dimanĉon la 1-an de julio 1990

Ĉeestas la kunvenon D. kaj P. Babin, S. Bourot, F. kaj H. Boyet, B. Cheverry, G. Dairon, G. Lagrange, P. Métivier, J. Vincent. Senkulpiĝis: J.P. Bobet, Y. Bodereau, P. Gémin, R. Lenel, F. Le Magadure, P. Naulet.

La prezidanto konstatas, ke la staĝanoj aliĝas pli kaj pli malfrue, ofte per telefono. Ĝis nun estas registritaj: 59 aliĝoj por la unua periodo de julio; 53 por la dua; 24 por la unua periodo de aŭgusto; 15 por la dua. Ĉar dum la lasta monato alvenis multaj informpetoj la nombro da partoprenantoj certe superos tiun de la ĝis nun ricevita aliĝoj.

Projekto de kalendaro estas starigita por la venonta jaro. Bazita sur la datoj anoncigitaj de la lernejoj ferioj jen tiu projekto: de la 28-a de aprilo ĝis la 5-a de majo: kursoj por infanoj kaj metodoj por lingvo-instruado. de la 15-a ĝis la 30-a de junio: internacia amika renkonto. de la 1-a ĝis la 8-a de julio: kultura kaj turisma semajno. de la 9-a ĝis la 22-a de julio: kursoj; la supera kurso baziĝos sur la studo de libroj de Baghy kaj de Kalocsay. Prelegoj. de la 23-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto: kursoj. de la 6-a ĝis la 19-a de aŭgusto: kursoj; studado de libroj. de la 20-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro: kursoj.

Kelkaj prelegantoj kaj kurs-gvidantoj sin anoncis. Pri la administrado de la staĝoj L. kaj P. Babin konsentas zorgi pri du periodoj: de la 15-a ĝis la 30-a de junio kaj de la 20-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro. Espereble pliaj volontuloj sin anoncos antaŭ la venonta komitatkunveno.

La prezidanto D. Babin prezentas la planitajn laborojn: sonizolado de du kurso-ĉambroj; farbado de la eksteraj toiletejoj; renovigo de la fasado de la kastelo. Estos ankaŭ necese aĉeti novan materialon por la kurso-ĉambroj.

Audrey Childs-Mee, kiu forpasis la 16-an de majo, donacis sian tutan bibliotekon al Gresillon. Estas necese studi la problemon de la transportado de Anglujo al Gresillon.

La komitatanoj poste preparas respondon al letero kiun Giorgio Silber sendis al la diversaj Esperanto-centroj, post kunvenoj pri "homogeneigo de la kalendaroj, programoj, sintenoj rilate la prelegantoj kaj kurs-gvidantoj. La Komitato, en sia respondo, insistas pri la fakto, ke la diversaj centroj estu memstaraj. La Esperanto-domo Gresillon pretas kunlabori sed ne akceptus centralizadon. Subskribis tiun leteron ankaŭ la reprezentantino de La Kvinpetalo.

La prezidanto fermas la kunsidon je la 16-a horo.

La sekretario: Guy Dairon

NE FORGESU, ke Gresillon proponas al vi: sian LIBRO-SERVON (petu 1 katalogon); siajn perkorespondajn kursojn diversnivelajn. Al la listo de la kursoj aldoniĝis KURSO PROGRAMITA POR FRANCLINGVAJ KOMENCANTOJ. Petu informojn: Esperanto-Domo, Gresillon 49150 BAUGE.

NIA KONKURSO



Tiu konkurso, kies unua serio aperis en la numero 1990-1, proponos, ĝis la lasta ĉijara numero, entute kvar seriojn de enigmoj kaj demandoj. Ĉiu serio povos doni ĝis 20 poentoj. La partoprenantoj rajtas sendi siajn respondojn post la apero de ĉiu serio aŭ kune post la apero de la lasta. La tuton oni estu sendinta plej malfrue la 15-an de februaro 1991.

La premioj estas :

- 1 - 1 000 f.f. por restado en Gresillon ;
- 2 - 500 f.f. por restado en Gresillon ;
- 3 - 250 f.f. por aĉetado de libroj el nia katalogo ;
- 4 - 150 f.f. por aĉetado de libroj el nia katalogo ;
- 5 - 100 f.f. por aĉetado de libroj el nia katalogo.

TRIA SERIO

1 — Jen la nomoj de kvin aŭtoroj, kiuj verkis originale en Esperanto. Vi devas kompletigi tiujn nomojn, ĉar mankas la konsonantoj. Por helpi vin ni aldonas interkrampe la titolon de unu el la verkoj de ĉiu el ili :

- L — r — — k (Regulus).
- V — ! — n — (Ĉu vi kuiras ĉine ?).
- Ŝt — m — ĉ (Ombro sur interna pejzaĝo).
- R — gn — rss — n (Ŝtupoj sen nomo).
- lg — (Ŝia lasta poŝtkarto).


2 — La repondoj al la subaj demandoj troviĝas en tiu-ĉi numero de la revuo :

- Kiom da granoj estis en unu funto ?
- Kiu estis la unua prezidanto de Amnesty International ?
- Kion pritraktas la skribaĵo trovita en tombo apud Tebe ?
- Kiu estis pseŭdonimo de prof. Waringhien ?
- Kion Herodoto opiniis pri la medicina scienco en Egiptio ?

3 — El la subaj kvar verkoj tri estas originale verkitaj en Esperanto. Kiuj ? Aldonu la nomon de la verkintoj kaj de la tradukinto : « Dona Barbara » — « Vivo kaj opinioj de Mastro M'saud » — « Abismoj » — « Vojaĝo al Kazohinio ».

4 — Ĉu la subaj asertoj estas veraj aŭ ne ? Respondu per « jes » aŭ « ne ».

- Madeleine Haudebine disvastigis Esperanton en Hindio en 1957-58.
- Strato Zamenhof, kiu aliras al la kastelo Gresillon, estis inaŭgurita en 1972.
- SAT estis devigata transigi sian administracion de Leipzig al Parizo en 1933.
- La « Nobla Korano » estis tradukita de Clelia Conterno-Guglielminetti en 1969.
- La Franca Laborista Esperanto-Unuiĝo fondiĝis en 1914.



Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (7,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10^a-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj).

Jugoslavio : Jugoslavia Stelo, D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo.

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 21 Rama Crescent Khandallah - Wellington 4 (aerpoŝte : 16 n.z.dol.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ.

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 2012-3 (70 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
 Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
 Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
 Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
 Por studi specialajn problemojn ;
 Por inter amikoj gaje libertempi ;
 Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34